



visitgraz



TOURISMUSINFORMATION REGION GRAZ

7 tagojn semajne je via servo

- informoj
- butiko por memoraĵoj kaj vendo de biletoj
- mendo de ĉambroj
- kreditbiletoj
- urb-ĝvidadoj & rondveturoj
- mendo de prospektoj

Herrengasse 16

Tel. +43/316/8075-0; Fakso: anstataŭigu la lastan ciferon „0“ per „15“
info@graztourismus.at, **graztourismus.at**



Hauptplatz

Vi atingas nin per  1, 3, 4, 5, 6, 7




DE LA URBO AL LA KAMPARO EN 10 MINUTOJ

La regiono de travivaĵoj Graz kunligas urban atmosferon kaj sudan etoson en la sola ĉefurbo de delikataĵoj de Aŭstrio kun la naturo, kulturo kaj multaj elstaraj ekskursceloj en ĉiuj direktoj

Impressum (kolofono): Por la enhavo respondeca: Graz Tourismus komisie de Tourismusverband Region Graz. Koncepto kaj formado: PILZ Werbeagentur GmbH. Fotoj: Tom Lamm, Harry Schiffer, Hans Wiesenhofer, Toni Muhr, Werner Krug, J. J. Kucek, Paul Stajan, Gerald Plattner, Andreas Hofer, Lupi Spuma, Schell Collection, iStock. Tekstoj: ©Graz Tourismus. Preso: Klampfer Austria-Export-Prospekt. Ĉiuj informoj kaj prezoj rezerve de kompost- kaj preseraroj (2025)

Ĉi tiu produkto estas farita laŭ la direktivoj de la aŭstria ekologi-signo ZU-24, UWZ: 900, kaj per PEFC-certigita papero kaj per puraj plantofarboj sen kemio kaj per sunenergie produktita kurento.



Lebensgefühl
Österreich


ESPO

REGIONO DE TRAVIVAĴOJ

GRAZ

VIDINDAĴOJ
EN GRAZ

Promenoj tra la historia
kaj la moderna Graz



KIOM DA TEMPO VI HAVAS POR VIA URBA PROMENADO?

Tri elektitaj promenoj al la plej belaj kaj interesaj
vidindaĵoj de Graz

Ĉi tiu broŝuro helpu vin esplori facile kaj agrable la historian, sed ankaŭ la modernan urbon Graz (prononcu: Grac). Ni elektis por vi tri diversajn promenojn kun diferencaj temaj fokuso. Kompreneble oni povas laŭdezire kombini ĉiujn tri promenojn inter si. Aldone vi trovos ankoraŭ sugestojn por vizitindaj celoj situantaj iom ekster la centro.

Bv. atenti la sezonajn tempojn de malfermo!

LA RONDIRO TRA LA MALNOVA URBO DE GRAZ

Paĝo 4

HISTORIA KAJ MODERNA: TRANSRIVEREN KAJ RETURNE

Paĝo 18

SUPER LA TEGMENTOJ DE LA URBO

Paĝo 28

VIZITINDAJ CELOJ EKSTER LA CENTRO

Paĝo 40

GVIDADOJ TRA LA URBO

Gvidadoj tra la urbo kaj rondveturoj (en lingvoj germana kaj angla) je diversaj temoj, tute laŭ deziro kaj plaĉo, estas mendeblaj ĉe la turisma informejo de la regiono Graz.!

INFORMOJ KAJ MENDOJ:

Tourismusinformation Region Graz, Herrengasse 16, 8010 Graz

Tel.: +43/316/8075-0; Fakso: anstataŭigu la lastan ciferon „0“ per „15“
info@graztourismus.at; **graztourismus.at**

ANTAŬ LA EKIRO: MALGRANDA URBA HISTORIO.

Graz en tempoakcela rigardo: Imperiestra urbo, renesanca juvelo,
urbo de la scienco, de la (moderna) arĥitekturo, kultura ĉefurbo

Pli ol 900 jaroj da vivanta historio de la dua plej granda urbo de Aŭstrio: Dum viaj urbopromenadoj vi malkovros multajn atesteojn pri tiu eventoplena pasinteco, multajn referencojn de la nuntempo kaj plurajn viziojn por la estonto. Sur neniu alia loko en la mondo oni trovas en tiom malvasta spaco tian elstaran arĥitekturon el ĉiuj konstru-stiloj – ek de la mezepoko ĝis la 21-a jarcento. Tial en 1999 la malnova urbo de Graz estis akceptita en la mondan kulturen heredaĵon de UNESKO.

1128/29: Unua dokumentita mencio de „gradec“ (malgranda kastelo)

1230: Nomumo kiel urbo kaj ĉirkaŭigo per muroj

1379: Ĉefurbo de Interna Aŭstrio

1440-93: Imperiestra rezidejo sub Frederiko 3-a

1564: Rezideja urbo sub ĉefduko Karlo 2-a

1585: Fondo de la Universitato

1594-99: Johano Kepler en Graz

1809: Sieĝo fare de la francoj, deviga malkonstruo de la fortikaĵoj; la horloĝturo kaj la sonorilturo estis elaciĝitaj de Graz-aj civitanoj

1945: 15 procentoj de ĉiuj loĝejoj detruitaj per aviadilaj atakoj

1958: Fondo de „Forum Stadtpark“ (artista centro en la urboparko)

1963: Fondo de la Belarta Universitato de Graz

1968: Fondo de „steirischer Herbst“ („Stiria Aŭtuno“ – kulturfestivalo)

1985: Fondo de „styriarte“ (somera muzika festivalo)

1999: Akcepto en la mondan kulturen heredaĵon de UNESKO

2001: Proklamo kiel unua Urbo de Homaj Rajtoj en Eŭropo

2003: Kultura ĉefurbo de Eŭropo

2008: Nomumo kiel ĉefurbo de delikataĵoj

2010: Plivastigo de la zono de la monda kultura heredaĵo je la Kastelo Eggenberg

2011: Nomumo kiel City of Design (urbo de dezajno)

2020: Graz Kultura Jaro 2020 – Kulturo kreas urbecan estonton



VIDINDAĴOJ EN GRAZ

Dum la sekvantaj tri urbaj promenoj la multaj vidindaĵoj de Graz estas komforte exploreblaj. La kulminojn ni aparte signis por vi: 🗺️

A La rondiro tra la malnova urbo de Graz: Pligrandigitan map-eltondaĵon kun la vidindaĵoj 1 – 22 vi trovas sur paĝo 4.

B Graz historia kaj moderna: Pligrandigitan map-eltondaĵon kun la vidindaĵoj 23 – 36 vi trovas sur paĝo 16.

C Super la tegmentoj de Graz: Pligrandigitan map-eltondaĵon kun la vidindaĵoj 37 – 50 vi trovas sur paĝo 27.

La koncernaj kunligaj punktoj al la aliaj rondiroj estas signitaj en la pligrandigitaj eltondaĵoj per **A B C**.

- 1

Korto de la Landa Domo 🗺️
- 2

Landa Arsenalo 🗺️
- 3

Generali-Korto
- 4

Surpentrita Domo/
Herzog-Korto
- 5

Ĉefplaco / Urbodomo
- 6

Luegg-domo
- 7

Korto de la Germana
Kavalira Ordeno
- 8

Stiegenkirche (preĝejo)
- 9

Palaco Saurau
- 10

Kortega bakejo Edegger-Tax
- 11

Kastelo/ Duobla helik-ŝtuparo 🗺️
- 12

Burggarten (Kastela Ĝardeno)
- 13

Stadtpark (Urboparko)
- 14

Dom (Katedralo) 🗺️
- 15

Mausoleum (Maŭzoleo) 🗺️
- 16

Priesterseminar (Pastra Seminario)
- 17

Glockenspiel (kariljondomo) 🗺️
- 18

Bermuda triangulo
- 19

Stempfer-strateto
- 20

Stadtpfarrkirche (preĝejo)
- 21

Operejo Graz
- 22

Kaiser-Josef-merkato
- 23

Mariahilfer-placo
- 24

Insulo en (rivero) Mur 🗺️
- 25

Schlossberg-placo
- 26

Palaco Attems
- 27

Graz-Muzeo
- 28

Muzeo por historio
- 29

Sack-strato
- 30

Kastner & Öhler
- 31

Schloßbergbahn (Kablofervojo)
- 32

Glockenturm (Sonorilturo)
- 33

Kazemata scenejo
- 34

Gotika pordego
- 35

Hackher-leono
- 36

Graz-Muzeo Kastelmonto
- 37

Kanonenhalle (Kanonhalo)
- 38

Chinesischer Pavillon
(Ĉina Pavilono)
- 39

Türkenbrunnen (Turka Puto)
- 40

Starcke-domo
- 41

Uhrturm (Horloĝturo) 🗺️
- 42

returne laŭ rokvojet
- 43

Herberstein-ĝardeno
- 44

Tunela sistemo en la monto
- 45

Kastelmonta glitejo

- 23

Kvartalo de Joanneum (muzeo)
- 24

Franciskana kvartalo
- 25

Franciskana preĝejo kaj monaĥejo
- 26

Promenado apud Mur
- 27

Domo de Belartoj Graz 🗺️
- 51

Kastelo Eggenberg 🗺️
- 52

Baziliko Mariatrost
- 53

Universitatoj de Graz
- 54

Botanika Ĝardeno
- 55

Hilmteich (lageto)/
Leechwald (arbaro)
- 56

Leechkirche (preĝejo)
- 57

Kastelruino Gösting
- 58


Kalvaria Monto
- 59

Schell Collection (ŝlosil-muzeo)
- 60

Nova-Air (hotelo, restoracio)

NOMBROJ, DATOJ, FAKTOJ


Enloĝantoj: ĉ. 300 000
Areo: 127,6 km²
Meza alteco super
Marnivelo: 353 m






GRAZ

(363 m)



© Copyright by Schubert & Franzke, St. Pölten 2022



LA RONDIRO TRA LA MALNOVA URBO DE GRAZ: PROMENADO EN LA MONDA KULTURA HEREDAJO.

Promenadu kun malfermaj okuloj tra la impresa malnova urbo de Graz, akceptita de UNESKO en la mondan kulturan heredaĵon. La varioplena rondiro tra la malnova urbo komenciĝas ĉe Tourismusinformation Region Graz (Turisma Informejo Regiono Graz) en Herrengasse 16.

Simple ekpromenu kaj surpriziĝu. Malantaŭ ĉiu angulo atendas nova malkovraĵo: Kaŝitaj stratetoj, romantikaj internaj kortoj, artismaj fasadoj kaj pompaj konstruaĵoj de la aristokratoj kaj burĝoj el pasintaj jarcentoj. Gotiko, renesanco, baroko kaj historiismo de la Habsburga monarĥio loĝas en Graz en najbara apudeco.

Ili formas komune la „plej bone konservitan urban kernon de Mezeŭropo“, kiu en 1999 estis akceptita en la mondan kulturan heredaĵon de UNESKO kaj en 2010 plivastigita per la baroka kastelo Eggenberg.

Tiu historie densa atmosfero de la malnova urbo kun la verda kastelmonto estis grava konstrubriko por la granda internacia resonado, kiun atingis Graz kiel „Eŭropa kultura ĉefurbo 2003“. En la varma sezono la stratoj, placoj kaj internaj kortoj formas belegan kulison por altvaloraj eventoj. Fascine moderna arĥitekturo kaj kreema ekonomio gvidis al la titolo „City of Design“ (Urbo de dezajno).

LA RONDIRO TRA LA MALNOVA URBO DE GRAZ: PROMENADO EN LA MONDA KULTURA HEREDAĴO.

Vi ekiras ĉe la Tourismusinformation Region Graz (turisma informejo de la regiono Graz) en Herrengasse 16 kaj atingas jam post malmultaj paŝoj la enirejon al la Korto de la Landa Domo.

La Herrengasse (strateto de la sinjoroj) estas la centro de la publika vivo en Graz kun multnombraj belaj palacoj kaj pompaj konstruaĵoj inter ĉefplaco kaj Jakomini-placo. Admirindaj estas i.a. „Landa Domo“, „Luegg-Domo“, „Surpentrita Domo“ aŭ la palaco de la Graz-a Mutuala Asekuro, kiu ek de 1895 havas sian sidlokon ĉi tie en la urbocentro kaj intertempe aktiviĝis en 13 landoj de Eŭropo. La Herrengasse kun siaj apudaj stratetoj estas rezervita al piedirantoj, biciklantoj kaj tramoj, ĝi estas rigardata kiel la butikum-zono de la urbo.

1 LANDHAUSHOF (KORTO DE LA LANDA DOMO) 🏡

Speciale la interna korto de la Landa Domo kun siaj arkadoj estas rigardata kiel majstroverko de la itala renesanco (Domenico dell'Allio). Malantaŭ la rondarkaj fenestroj kunvenas la Stiria Landa Parlamento en sia kunsida salonego. En la advento la fama glaci-kripo ĉi tie trovas la konvenan kadron. En la ceteraj sezonoj en la brila atmosfero de la korto de la Landa Domo okazadas koncertoj, teatraj prezentadoj kaj ĉiusepacaj festoj.

KONSILO: 2* LANDESZEUGHAUS (LANDA ARSENALO) 🏰

Al la Landa Domo rekte limas la Landa Arsenalo, iam la plej grava armila deponejo de Interna Aŭstrio, nuntempe unu el la plej grandaj historiaj armilkolektoj de la mondo kun pli ol 30 000 ekspoziciaĵoj. (Enirejo: Herrengasse 16)

3 ĜENERALI-KORTO/ 4 SURPENTRITA DOMO

Graz estas fama pro siaj romantikaj internaj kortoj – kelkajn el ili vi malkovros ĉe tiu ĉi rondiro, kiel ekz. la Ĝenerali-korton (enirejo Herrengasse n-ro 9). Iom pli poste atendas la „surpentrita domo“ (n-ro 7). La fasado estis surpentrita en 1742 fare de la barokpentristo Johann Mayer per freskoj. Ili prezentas la diojn de la greka-romia mitologio. La bela interna korto estas konata kiel „Herzoghof“ (duka korto)



* Zeughaus (Arsenalo) –Inter la impresaj ekspoziciaĵoj troviĝas speciala valorajo: unu el tutmonde nur sep plene konservitaj ĉevalkirasoj.

LA RONDIRO TRA LA MALNOVA URBO DE GRAZ: PROMENADO EN LA MONDA KULTURA HEREDAĴO.

Promenante laŭlonge de Herrengasse, preter hejmecegaj gastejoj ĝardenoj, jam post kelkaj minutoj vi atingas la ĉefplacon de Graz.

5 HAUPTPLATZ/RATHAUS (ĈEFPLACO/URBODOMO)

La ĉefplaco kaj la urbodomo estas la koro kaj centro de la urbo. Meze de la ĉefplaco staras puto-monumento de Erzherzog Johann (ĉefduko Johano), starigita en 1878 kiel rememorigo pri la „stiria princo“. La impresa urbodomo kun kupolo, horloĝo kaj angulaj turetoj ek de la fino de la 19-a jc. superregas la ĉefplacon de Graz.

6 LUEGG-DOMO

El la belegaj fasadoj ĉirkaŭ la ĉefplaco speciale elstaras ĉe la angulo al Sporgasse la „Luegg-domo“ kun sia stuk-fasado kaj arkadoj. Atentaj rigardantoj ne pretervidos sur la fasado la buŝojn kaj nazojn kaŝitajn inter la girlandoj de fruktoj kaj floroj.

7 KORTO DE LA GERMANA KAVALIRA ORDENO

Sendube vidinda estas la gotika arkada korto de la Germana Kavalira Ordeno, tute kovrita per „Mur-buletoj“. En Graz oni nomas „Mur-buletoj“ tiujn ŝtonojn rondigitajn per la akvoŝto de la rivero Mur, kiuj estis uzitaj kiel pavima materialo por stratetoj kaj kortoj. La ŝtonportalo kun la kruco de la ordeno sur la fina ŝtono devenas el la unua kvarono de la 16-a jc. (Enirejo Sporgasse 22).

KONSILO: MALNOV-URBA TRAMO – SENKOSTE TRA LA INTERNA URBOZONO

En la malnova urbo de Graz vi veturas senkoste per tramo, pli precize dirite inter Jakomini-placo kaj Ĉefplaco plus unu stacion plu en ambaŭ direktoj, do ekz. ĝis Schlossberg-placo aŭ ĝis la Domo de Belartoj!





MEMORAĴOJ EL GRAZ

Ĉu vi serĉas donacon por amikoj kaj parencoj aŭ ĉu vi deziras kunpreni ankaŭ por vi mem malgrandan memoraĵon pri via restado en Graz?

visitGRAZ-Shop

Herrengasse 16 / Enirejo Landszeughaus
(Landa Arsenal)

Tel. +43/316/8075-0

info@graztourismus.at

graztourismus.at

Shop
visitgraz



Pri vizio, kiu ŝanĝis nian urbon.



Kiel ĉi tie, sur la ĉefplaco de Graz, vi renkontas lin kaj liajn ideojn ĉiupaŝe: Ĉefduko Johano de Aŭstrio. Pli ol 50 jarojn vivis kaj aktivadis la „Stiria Princo“ en nia urbo – sennombraj evoluoj kaj fondaĵoj atestas ĝis hodiaŭ pri lia energio.

Lia vizio pri pli bona vivo, precipe por la simplaj homoj, gvidis en 1828 ankaŭ al la fondado de la Grazer Wechselseitige Versicherung (Mutuala Asekuro de Graz).

Ek de tiam el la origina fajro-asekuro evoluis internacia entrepreno kun pli ol 4 600 kunlaborantoj, kiu unuigas sub unu tegmento asekurojn, bankojn kaj kompaniojn pri nemoveblaĵoj en 13 landoj de Eŭropo – kun ĉefa sidejo en Graz.

Kaj ĝis hodiaŭ GRAWE sentas sin ŝulda al la valoroj de sia fondinto: ligiteco al la hejma regiono, fidindeco kaj proksimeco al la homoj.

La **plej rekomendita**
asekuro de Aŭstrio



Ĉiujare en sendependa studo (FMV Recommender Award) 8 000 klientoj de asekuroj kaj bankoj en Aŭstrio estas demandataj pri sia kontenteco/preteco al rekomendado al aliaj. GRAWE ĝojas, ke en 2025 ĝi estis premiita jam la 13-an fojon sinsekve per la unua loko ĉe la superregionaj asekuroj. Detaloj: grawe.at

LA RONDIRO TRA LA MALNOVA URBO DE GRAZ: PROMENADO EN LA MONDA KULTURA HEREDAĴO.

Ek de la ĉefplaco vi nun paŝas iomete supren laŭ la pavimita Sporgasse, unu el la plej romantikaj stratetoj de la urbo.

8 STIEGENKIRCHE (PREĜEJO ĈE LA ŜTUPARO) – (sen bildo)

La plej malnova paroĥa preĝejo de Graz la unuan fojon estis menciita en dokumento en 1343. La kirko, konata precipe kiel porstudenta preĝejo, en la historia urbokerno de Graz, apogas sin dense al la suda flanko de la kastelmonto, kaŝita malantaŭ la potencaj muroj de iama aŭgustena monaĥejo.

9 PALACO SAURAU

En la jaro 1566 Pankraz von Windischgrätz starigis proksime de la tiam ankoraŭ ekzistanta mezepoka urbomuro potencon kvar-alan palacon, nun konata kiel Palaco Saurau (prononcu Saŭraŭ). Ĉu okazas atako de supre? Viro kun barbo, turbano kaj ponardo minace rigardas malsupren kaj instigas la scivolon de la preterpasantoj. Bone, ĉar la figuro de la legendoveka turka militisto sub la tegmento ornamas unu el la plej belaj konstruaĵoj de la urbo. (La korto ne estas alirebla.)

KONSILO: 10 HOFBÄCKEREI EDEGGER-TAX (KORTEGA BAKEJO)

Iomete pli malsupre laŭ Sporgasse vi nun turnas vin maldekstren al Hofgasse (kortega strateto), tie okulfrapas pompa magazena portalo el ligno – kronita per orumita duobla aglo: La kortega bakejo Edegger-Tax, kie delikataj bakaĵoj el la imperiestra tempo, kiel ekz. „Sissi-kisetoj“ aŭ „imperiestra biskvito“ invitas al gustumado.

11* KASTELO/DUOBLA HELIK-ŜTUPARO 🏰

Laŭlonge de Hofgasse vi venas al Freiheitsplatz (placo de la libereco) kaj al Schauspielhaus (teatro), klasikisma konstruaĵo. Mallonge antaŭ Burgtor (Kastela Pordego) troviĝas la enirejo al la kastelo (Hofgasse 15), tra la unua korto vi atingas la duoblan helik-ŝtuparon (1499), majstroverkon de la ŝtontajla arto fine de la gotika epoko (apud Stiege III – ŝtuparo 3). La kastelo nuntempe estas la sidejo de la Stiria Landa Registaro.



* Duobla helik-ŝtuparo – atendu interesajn sinturnojn, surprizajn renkontojn, disiĝon kaj kunfandiĝon de la du ŝtuparoj sur tri etaĝoj!

LA RONDIRO TRA LA MALNOVA URBO DE GRAZ: PROMENADO EN LA MONDA KULTURA HEREDAĴO.

Post la Kastela Pordego vi promenas al la iomete malsupren kondukanta Bürgergasse – al pliaj „klasikaĵoj de Graz“.

KONSILO: 12 KASTELA ĜARDENO / 13 URBOPARKO

Tra la Kastela Pordego vi atingas la enirejon al la Kastela Ĝardeno kaj plu la urboparkon. Speciala pompaĵo estas la urboparka fontano, akirita en 1873 ĉe la Monda Ekspozicio en Vieno. Ĝia loko en la parko ricevis de la urbo Graz la nomon „Placo de la Homaj Rajtoj“.

14 KATEDRALO 🏰

La katedralon konstruigis imperiestro Frederiko 3-a inter 1438 kaj 1464 kiel kortegan preĝejon. Maldekstre sur la suda flanko de la katedralo troviĝas sub malgranda antaŭtegmento la landplaga bildo, kiu prezentas tiujn tri plagojn (pesto, turkoj, akridoj), kiuj trafis Stirion en la terura jaro 1480.

15 MAŬZOLEO 🏰

Imperiestro Ferdinando 2-a – ankoraŭ rezidante ĉi tie kiel reganto de Interna Aŭstrio – starigis en Graz la arthistorie plej signifan tombomonumenton de Habsburgano. Giovanni Pietro de Pomis, la itala kortega pentristo, transprenis la planadon. **Atentu: Sezonaj tempoj de malfermo!**

16 PASTRA SEMINARIO

Diagonale vid-al-vide de la maŭzoleo kaŝas sin malantaŭ impona fasado la renesanca korto de la jezuita kolegio (nuntempe pastra seminario), al kiu limas la „Malnova Universitato“ fondita en 1585 (Hofgasse 14).

KONSILO: 17 GLOCKENSPIEL (KARILJONA DOMO) 🏰

Tra Abraham-a-Santa-Clara-Gasse vi atingas la Glockenspiel-placon. Je la 11-a, 15-a kaj 18-a h. malfermiĝas du fenestroklapoj kaj lignoskulptita popolokostuma paro turnas sin je la sono de kariljona instalaĵo.

18 ĈIRKAŬ MEHL-PLACO KAJ FÄRBER-PLACO

Se oni levas la rigardon super la bone vizitatajn gastejojn, restoraciojn, kafejojn kaj trinkejojn, oni vidas mirinde belan renesancan arĥitekturon kaj kiel kontraston la M 1 – modernan arĥitekturon en la koro de la urbo. „Bermuda-triangulo de Graz“ noktaĵ svarmantoj nomas ĉi tiun kvartalon, ĉar kelk-iu dum horoj restas ĉi tie ne retrovebla...



13



14



15



16



17



18

LA RONDIRO TRA LA MALNOVA URBO DE GRAZ: PROMENADO EN LA MONDA KULTURA HEREDAĴO.

Returne trans Mehl-placo (Farunplaco) kaj Gockenspiel-placo vi atingas tra la Enge Gasse (mallarĝa strateto) la „elegantan“ Stempfergasse. Ĉu jam (ree) malsata kaj soifa? Post kelkaj minutoj vi estos sur la kamparana merkato!

19 STEMPFERGASSE (sen bildo)

Stempfergasse ofertas multnombrajn kulminojn por aĉetado, kun ekstravagancaj butikoj kaj internaciaj unuarangaj markoj. Cetere, en Stempfergasse loĝis Johannes Kepler, faru rigardon al la bela interna korto (n-ro 6)! Nun pluiru al Herrengasse, maldekstren.

20 STADTPFARRKIRCHE (URBA PAROĤPREĜEJO)

En Herrengasse abunde ornamita baroka turo superstaras ĉiujn aliajn konstruaĵojn – la urba paroĥpreĝejo. Ĉia eventoplena historio rakontas pri malgranda gotika kapelo en la eksa juda kvartalo, pri ĝia tempo kiel monaĥeja preĝejo de la dominikanoj, pri barokaj kaj nov-gotikaj transformoj kaj pri la bomboj de la dua mondmilito. Pri la malhela tempo memorigas en la vitraloj la bildoj de Hitler kaj Mussolini.

21 OPEREJO GRAZ

Tra Herrengasse kaj plu maldekstren tra Opernring (Opereja bulvardo) vi venas al la operejo de Graz, konstruita en 1899 laŭ la planoj de la fama arĥitekta duopo Helmer kaj Fellner. Ĉi tie tradicio kaj moderna tempo impresrenkontiĝas. Ekscitan kontraston formas la ŝtala skulptaĵo „luma glavo“ de Hartmut Skerbisch, staranta antaŭ la operejo kiel simbolo por malfermiteco kaj toleremo.


22 KAISER-JOSEF-MARKT (MERKATO)

Malantaŭ la operejo troviĝas sur Kaiser-Josef-Platz (Imperiestro-Jozefo-Placo) la plej granda kamparana merkato de Graz. La kamparanoj el la regiono alportas siajn mem kultivitajn produktojn en la urbon kaj ofertas al la urbanoj por aĉeti fruktojn kaj legomojn, plantojn kaj florojn, kernoleon, panon kaj multon alian. Jen speciala travivaĵo por okuloj kaj gustumado. (lunde ĝis sabato 6-a – 13-a h.)

KONSILO: STIRIA KUKURB-KERNA OLEO POR KUNPRENI!

Oleo el kukurbaj kernoj, la „nigra oro de Stirio“, estas bongusta kaj treege saniga – bonega sur salatoj, por plidelikatigi manĝaĵojn kaj eĉ sur vanila glaciaĵo (vi legas ĝuste!) – trankvile kunprenu boteleton de la kamparana merkato.





HISTORIA KAJ MODERNA: TRANSRIVEREN KAJ RETURNE.

La impresa kontrasto inter tradicia kaj moderna Graz.
La projekto „kultura ĉefurbo de Eŭropo“ ĉi tie postlasis
siajn plej videblajn spurojn.

Sur unu (rivera) flanko: Mallarĝaj stratetoj, kiuj la tutan tagon donas malvarmetan ombbron, malgrandaj butikoj, miksaĵo de plej diversaj odoroj, sunbrile inunditaj placoj, bunta voĉ-kunsono en la strataj kafejoj, serenaj homoj ĉiuaj. La ludema, sud-etose impresanta flanko de la urbo.

Kelkaj paŝoj trans Mur – tio estas la rivero dividanta la urbon Graz – havigas intencitan kontraston: Ek de 2003, la jaro en kiu Graz estis kultura ĉefurbo de Eŭropo, ĉi tie hejmas la estonto: La bizara Domo de Belarto „friendly alien“ hejmiĝis inter la najbaraj malnovaj domoj kaj tie videble sentas sin bone. La Graz-anoj amas tiun konstruaĵon kun ĝia aparta beleco kaj jam konsideras ĝin kiel novan, duan ekkonilon de la urbo. Flosanta konko en la rivero kunligas la du flankojn de la urbo: La insulo en Mur.

HISTORIA KAJ MODERNA: TRANSRIVEREN KAJ RETURNE.

De Herrengasse vi iras al la ĉefplaco kaj de tie maldekstren tra la mallarĝa ombriga Franziskanergasse (Franciskana strateto) plu al la Franciskana kvartalo.

23 JOANNEUMSVIERTEL

La kvartalo de Joanneum estas ne nur la kora parto de la dua plej granda muzeo de Aŭstrio, sed ankaŭ grava urb-arĥitektura akcento en la interna urbo de Graz.

24* FRANZISKANERVIERTEL

La Franciskanan kvartalon oni nomas ankoraŭ hodiaŭ ankaŭ la „bovidaĵa kvartalo“. Tiu nomo originas el la jarcentoj longa tradicio de la viandistoj, kiuj ĉi tie ofertis siajn varojn. Nuntempe la kvartalo estas renkontiĝejo por junuloj kaj olduloj kaj oni sentas sudlandan atmosferon kulise kaj kulinare: ĉu italaj aŭ stiriak bongustaĵoj – ĉi tie vi trovas ambaŭ.

25 FRANCISKANA PREĜEJO KAJ MONAĤEJO

Preskaŭ kiel la horloĝturo, la turo de la Franciskana preĝejo signas la urbaspekton de Graz. Ĝi apartenas al la plej malnova monaĥejo de la urbo, fondita en 1239 kiel minorita monaĥejo. Situant en sudokcidento, rekte ĉe la urbomuro, en strategie grava loko, la potenca turo – malkutima por almozpetanta ordeno – estis konstruita je ordono de la urba registaro en la 17-a jarcento kiel urba turo. Al la paroĥa preĝejo Ĉieliro de Maria, gotika hala preĝejo, limas la monaĥejo de la franciskanoj.

KONSILO: 25 FRANCISKANA MONAĤEJO

Faru rigardon al la interno de la monaĥejo, la gotika klostro al la Jakoba Kapelo impresos vin. Estas loko de trankvilo kaj paco meze en la laŭta vicleco de la urbo.

26 MUR-PROMENADO (sen bildo)

Ek de la Franciskana placo estas nur kelkaj paŝoj en direkto al Erzherzog-Johann-Brücke (Ĉefduko-Johano-ponto). Ĉi tie troviĝas la malsuprenirejo al la „Mur-Promenade“ (promenado apud la rivero Mur) – ideala loko por iomete ripozhalti kaj eventuale pendigi la lacajn piedojn en la riveron. La Mur-promenejo fariĝis grava



23



25



24



25

* Kulinara bier-rondiro – de aprilo ĝis oktobro. Amuza rondiro kun gustumado, ĉe kiu vi ankaŭ lernas distingi inter la mezuroj „Pfiff“, „Seitl“, „Glas“ kaj „Krügerl“.

HISTORIA KAJ MODERNA: TRANSRIVEREN KAJ RETURNE.

Trans la Erzherzog-Johann-ponton vi promenas al la alia flanko de la rivero – antaŭ vi troviĝas la nova, dua ekkonilo de la urbo: la Kunsthau (Domo de Belartoj).

27* KUNSTHAUS GRAZ (DOMO DE BELARTOJ) 🏠

La arĥitektoj Peter Cook kaj Colin Fournier planis kaj en 2003 konstruis ĉi tiun impresan konstruaĵon. La atentostreĉa ludo inter la nova dom-artaĵo ĉe la bordo de Mur kaj la malnova horloĝturo sur la kastelmonto fariĝas signomarko de ĉi tiu urbo kaj montras la produktivan streĉan rilaton inter tradicio kaj avangardo.

La Domo de Belartoj gastigas interŝanĝajn ekspoziciojn (lunde fermitel!), la „Camera Austria“ (foto-ekspoziciojn) kaj kafejon.

28 MARIAHILFER-PLACO

Preter Palaco Thinnfeld, evoluinta al „arto-nodo“ (ĝi gastigas la Domon de la Arĥitekturo kaj la Arto-Unuiĝon de Graz), la strato kondukas vin al Mariahilfer-placo, karakterizita de la impona Mariahilfer-preĝejo, la minorita monaĥejo kaj la kulturcentro Minoriten. La preĝejo konstruita komence de la 17-a jc. ricevis sian impresan duturan fasadon nur en 1742.

KONSILO:

De ĉi tie ne plu estas malproksime al la kamparana merkato sur Lend-placo kaj al la Muzeo de seruroj kaj ŝlosiloj.

29 MURINSEL (INSULO EN MUR) 🏠

Nekutiman ekkonilon en la akvo formas la „Mur-insulo“ instalita en 2003 okaze de la Kultura Ĉefurbo. Laŭ skizo de la Nov-Jorka artisto Vito Acconci estiĝis ĉi tie flosanta konkono, kiu per du pontet-vojoj estas ligita kun ambaŭ Mur-bordoj. Ĝi entenas kafejon kaj amfiteatron.

KONSILO: GRAZ CARD KAJ GRAZ CARD LIGHT

Dum 24, 48 aŭ 72 horoj esploradi Graz-on kaj senkoste ĝui multnombrajn allogaĵojn. La Graz Card – biletoj estas la perfektaj akompaniloj por malkovra rondirado tra Graz kaj idealaj por vojaĝo kun la tuta familio: Po karto 2 infanoj sub 15-jaraĝaj senkoste kune partoprenas en ĉiuj avantaĝoj. Pliaj informoj sub graz-card.com



27



28



28



29

* „Nozzles“, tiel nomiĝas la karakterizaj elstaraĵoj de la Domo de Belartoj. Kelkaj el ili servas kiel lumfonto.

HISTORIA KAJ MODERNA: TRANSRIVEREN KAJ RETURNE.

Trans la Mur-ponteton vi venas al Sackstraße (sak-strato) kaj plu al Schlossberg-placo – kun bela rigardo al la kastelmonto kaj la kastelmonta ŝtuparo.

30 SCHLOSSBERGPLATZ (KASTELMONTA PLACO)

Dekstre, apud la enirejo al la kastelmonta tunelo, staras la plej malnova dokumente menciita konstruaĵo de la urbo, la Reinerhof (korto de Rein) el la 13-a jc., iam en la posedo de la monaĥejo Rein. La kastelmonta ŝtuparo estas unu el kvar eblecoj por supreniro sur la kastelmonton de Graz. Ĝi estis enbatita en la rokon de militkaptitoj de la unua mondmilito kaj origine havis 260 ŝtupojn.

31 PALACO ATTEMS

La Palaco Attems kun siaj impresaj dimensioj signas ek de 1702 la Sackstraße (la sakstraton). La familio – proprietulo ĝis 1962 – apenaŭ ŝanĝigis la konstruaĵon; tiel Graz posedas kun la Palaco Attems valoran, origine konservitan barokan palacon. (La ejoj ne estas publike alireblaj.)

32* GRAZ-MUZEO

La Graz-Muzeo estas la kulturhistoria muzeo de la urbo Graz, kies kolektaĵoj kaj ekspozicioj traktas kaj pri la historio kaj pri la estanteco de la urbo. Ĉe tio enfokusigas temoj kiel varieco, generacia historio kaj urba evoluo, krome arĥitekturo, religio kiel ankaŭ arto kaj kulturo.

33 MUZEO POR HISTORIO

La tuta diverseco de la kulturhistoria kolektaĵo de la Universalmuzeo Joanneum. La nova ekspozicia deponejo montras la riĉecon de la kolektaĵo, kiu estis fondita en la 19-a jc., por dokumenti la kulturajn epokojn de Stirio ek de la alta mezepoko. Nuntempe la kolektaĵo ampleksas pli ol 35000 objektojn. Ĉ.2000 muzikinstrumentoj, mebloj, vestoj por sinjorinoj, sinjoroj kaj infanoj, ordenoj kaj medaloj, modellibrooj kaj tapiŝoj, kaĥeloj, bustoj, seruroj, kandelingo, tombokrucoj, trink-glasoj kaj florvazoj estas nun prezentataj kiel densa kunmetaĵo de miloj da objektoj sur areo de rondcifere 450 m².



30



31



32



33



33

* La ekspozicio „360 GRAZ – Eine Geschichte der Stadt“ (historio de la urbo) en la Graz-Muzeo ilustras la urban historion de Graz el loka kaj ankaŭ el eŭropa perspektivo – ankaŭ en cifereca formo sub 360.grazmuseum.at

HISTORIA KAJ MODERNA: TRANSRIVEREN KAJ RETURNE.

Vi promenas plu en Sackstraße direkte al la Ĉefplaco de Graz, preter butikoj de antikvaĵoj kaj brokantaĵoj, jam kun rigardo al la urbodomo antaŭ vi.

34 SACKSTRASSE (sen bildo)

La Sackstraße (sak-strato) – la plilongigo de Herrengasse elirante de la Ĉefplaco – estas la arto-zono de Graz. Ĝis la Kastelmonta Kablofervojo vi trovas ĉi tie magazenojn de antikvaĵoj, galeriojn, butikojn por ornamaĵoj, metiejojn, muzeojn & atelierojn, kiuj ofertas modernan kaj antikvan arton, same popolan kiel ankaŭ metian arton.

Fascina medio unuigita kun tradicia komerco donas al la arto-zono specialan allogecon.

35 KASTNER & ÖHLER

Vera institucio de Graz estas la tradici-riĉa – kaj supermoderna – magazeno Kastner & Öhler: La plej bela magazeno de Aŭstrio kaj ankaŭ jam internacie premiita, ofertas en 6 etaĝoj kaj sur 20 000 m² la plej grandan modo-elekteblon de Aŭstrio! De la tegmenta teraso vi havas nekredoblan rigardon al la proksima kastelmonto kaj la ruĝa tegmenta pejzaĝo de la urbo. Sur la Skywalk (ĉiela irvojo) vi ŝvebas kvazaŭ super la urbo kaj la horloĝturo estas palpeble proksima.

36 KASTELMONTA KABLOFERVOJO (bildo sur paĝo 31)

Ne forgesota estu la kastelmonta kablofervojo je la kontraŭa fino de Sak-strato. Per ĝi oni supreniĝas ĉe rava panoramo kaj kliniteco de 61 % - alten sur la monton meze en Graz, sur la kastelmonton de Graz, kun la ekkonilo de la urbo, la horloĝturo.

KONSILO: KASTELMONTA LIFTO (bildo sur paĝo 37)

Nekutima, rapida kaj samtempe komforta maniero surgrimp i la kastelmonton estas la kastelmonta lifto. La estetike alloga solvo de la lifto, enkonstruita en la internon de la monto, estas ege praktika, se oni iam havas malmultan tempon aŭ lacas piede. La vitraj kabinoj de la lifto dum la veturo allasas rigardon al la lumigita roka strukturo – montospektado de interne.

Al la kastelmonto estas dediĉita nia sekvanta rondiro.





LA GRAZ-A KASTELMONTO: SUPER LA TEGMENTOJ DE LA URBO.

Nia tria promonado kondukas vin sur la kastelmonton.
Ĝuu la belegan rigardon al la ruĝa tegmenta maro de la
malnova urbo de Graz.

Kiu urbo krom Graz povas fieri pri la posedo de verda suririnda – kaj
admirinda – monto meze en la malnova urbocentro? La kastelmonton.
Ĝi altiras la homojn: printempe per freŝa verdo kaj la unuaj sunradioj;
somere per ombrodonaj arboj kaj subĉielaj spektakloj; aŭtune per sia
Fkolorpompo; vintre oni ĉi tie povas fuĝi el la urba grizo. Alveninte

supre oni povas malkovri multon kaj ĝui belegan panoramon: al la ruĝa
pejzaĝo de la tegmentaj tegoloj, al la montoj kaj montetoj de la ĉirkaŭaĵo.
Ĝus enamiĝintoj kutime perceptas malpli da tio – la loko daŭre estas
konsiderata kiel unuaranga romantika renkontiĝejo. Tamen, ĉiukaze
penindas ĉirkaŭrigardi: jam la horloĝturo de Graz estas kuriozaĵo per
si mem: La malgranda kaj la granda montriĵo estas ja interŝanĝitaj, kio
jam ĉe ne malmultaj vizitantoj gvidis al komparo de horloĝoj.

LA GRAZ-A KASTELMONTO: SUPER LA TEGMENTOJ DE LA URBO.

Ekzistas kvar tre ŝatataj eblecoj veni sur la 473 m altan kastelmonton: per la kastelmonta kablofervojo, per la vitra lifto ene de la monto, piedire laŭ la kastelmonta ŝtuparo aŭ ek de la Karmeliterplatz (Karmelita placo).

SUR LA KASTELMONTO

Malgranda kastelo, kiu antaŭ pli ol 1 000 jaroj staris ĉi tie sur roko-elstaraĵo, donis al la urbo ĝian nomon: El la slava Gradec por „malgranda kastelo“ poste fariĝis Graz. Ek de 1544 ĝi estis plukonstruita laŭ planoj de Domenico dell'Allio al potenca renesanca fortikaĵo. La kastelo estas listigita en la Guinness-libro de rekordo liel plej forta fortikaĵo de ĉiuj tempoj. Eĉ Napoleono komence de la 19-a jc. ne povis konkeri ĝin. Nur kiam en 1809 li okupis Vienon kaj minacis detrui la ĉefurbon, Graz kapitulacis kaj preskaŭ ĉiuj instalaĵoj de la fortikaĵo estis malkonstruitaj – nur la sonorilturo kaj la horloĝturo restis, ĉar ili estis elaĉetitaj de la Graz-anoj kaj tiel protektitaj kontraŭ la detruo.

37* SONORILTURO

La unua stacio sur la kastelmonto estas la sonorilturo, konstruita en 1588, kun la plej fama sonorilo de Graz, la „Liesl“. Ĉu la nomo devenas de antaŭa Elisabeth-kapelo aŭ de la vorto „Verlies“ (karcero), estas neklare. (En la kela volbaĵo troviĝis la plej kruela malliberejo de la fortikaĵo). La sonorilo pezas preskaŭ 5 tunojn kaj povis esti movita nur kiam du forĝistoj en pena laboro estis konstruintaj specialan meĥanisman por la sonorigado.

38 KAZEMATA SCENEJO

Ĉu vi scias, kio estis kazemato? La kazematoj antaŭe estis provizejoj, kiuj servis ankaŭ kiel dormejoj por kaptitoj. Nuntempe la kazemata scenejo estas romantika kuliso por brilegaj prezentaĵoj de operoj kaj koncertoj.



* La „Liesl“ en 1587 estis fandita el 101 turkaj kanonkugloj kaj tial batas same ofte – nome trifoje ĉiutage, je la 7-a, 12-a kaj 19-a h.

LA GRAZ-A KASTELMONTO: SUPER LA TEGMENTOJ DE LA URBO.

La kastelmonto estas kovrita de vasta vojreto.
Vi promenas sen granda peno al la unuopaj vidindaĵoj.

39 GOTIKA PORDEGO (sen bildo)

Ĉi tiu kastela pordego, ree malkovrita en la jaro 1982, kondukis el la „Malantaŭa ĉirkaŭfermejo“ al la interno de la mezepoka kastelo kaj havis la nomon „malantaŭa pordego“. Ĉi tie en la mezepoko staris krenele kronita pordega turo kaj du pordegaj arkoj, el kiuj la ekstera ankoraŭ nun estas tre bone konservita. En 1894 la plataĵo estis ŝanĝita al panorama teraso. La gotika pordego en la jaroj 1998 ĝis 2001 estis denove metita en bonan staton kaj fariĝis libere alirebla por la publiko.

40 HACKHER-LÖWE (HACKHER-LEONO)

La Hackher-leono memorigas pri la lasta militista defendanto de la Graz-a kastelo – majoro Franz Xaver Freiherr von Hackher, kiu en 1809 „kun manpleno da soldatoj“ rezistis al la plurmonate longa sieĝo fare de la superforto de la francoj. Ĉar ne ekzistis bildo pri majoro Hackher, estis starigita leono je lia honoro. En la mezo de la supra plataĵo troviĝas la granda cisterno. Ĝi estis konstruita en la 16-a jc. kaj havas enhavan kapaciton de 900 000 litroj.

41 GRAZ-MUZEO KASTELMONTO

La nova Graz-Muzeo Kastelmonto malfermas la pordon al la historio de la urba monto de Graz. Tutjare malfermita kaj parte subĉiela, ĝi estas la unua akceptejo por ĉiuj kastelmonto-gastoj. En la Graz-Muzeo Kastelmonto ĉiuj vizitantoj ricevas informojn kaj orientadon en historia kaj topografia rilato. Ĉi tiu nova, famili-taŭga muzeo laŭ nuntempa maniero prezentas la historion de la kastelmonto kaj ĝian signifon por Graz.

42 KANONHALO

La kanonhalo en la Graz-Muzeo Kastelmonto enhavas kvar kanonojn, kiuj memorigas pri la malnova funkcio de la kanona bastiono kiel sidejo de la fajrogardo de Graz. En la okazo de incendio oni ĉi tie sonigis pafegojn por averti la loĝantaron.



LA GRAZ-A KASTELMONTO: SUPER LA TEGMENTOJ DE LA URBO.

Sur la kastelmonto ni iru senhaste direkte al la ekkonilo de Graz – preter pliaj vidindaĵoj.

43 ĈINA PAVILONO

La Ĉina Pavilono estis starigita ĉ. 1890 kaj anstataŭis pli malnovan romantikan vinlaŭbon. „Episkopa seĝo“ estas nomata la ŝtona benko kun detruitaj literoj kaj gotika ornamaĵo sur la malantaŭa flanko, ĉar ĉi tie, laŭ la legendo, en 1796 la episkopo Grafo Nadasdy mortis liberigita el la karceroj de la kastelmonto post 40-jara aresto.

KONSILO: 44 TURKA PUTO

1554 – 1558 ĉi tiu „profunda puto“ estis fosita 94 metrojn malsupren ĝis la grundakvo de Mur, por havi la eblecon provizi la fortikaĵon per sufiĉe da akvo ankaŭ ĉe pli longa sieĝado. Sian nunan nomon la puto ricevis nur en la 19-a jc., ĉar laŭdire kaptitaj turkoj estis partoprenintaj en ĝia fosado.

45 STARCKE-DOMO

En la jaro 1575 ĉe la malsupro de la Stallbastei (stalbastiono) estis starigita pulvoturo, kiu en 1809 estis detruita de la francoj. Sur ties ruinoj estis konstruita vinkultivista domo kaj sur la terasoj situantaj sub ĝi plantita vitaro. Ĉi estis nomita laŭ la kortega aktoro Gustav Starcke, kiu loĝis en la domo. Nuntempe ĉi tie troviĝas restoracio, sur kies terasoj oni povas ĝui mirinde belan rigardon al Graz.

46* HORLOĜTURO 🕒


Kaj finfine vi nun venas al la horloĝturo, la tradicia ekkonilo de la urbo. Kvankam la horloĝa meĥanismo en la 28 metrojn alta turo ek de 1712 akurate batas je la horoj, sub la romantika ekkonilo de Graz kun la belega rigardo al la urbo oni ja foje povas forgesi la tempon. Sian nunan formon ricevis la origine mezepoka defend-turo ĉ. 1560. Same la karakterizan lignan rondiran galerion por la fajrogardo. Tri sonoriloj sonoras de la horloĝturo, tri blazonoj ornamas la murojn.



43



44



45



46

* Ĉu en Graz la horloĝoj montras alian tempon? Ne. La fakto, ke origine ekzistis nur grandaj montriloj por la horoj, kaj tiuj por la minutoj aldoniĝis nur poste, kaŭzis interŝanĝon de la montriloj.

LA GRAZ-A KASTELMONTO: SUPER LA TEGMENTOJ DE LA URBO.

Ĉirkaŭ la kastelmonto plektiĝas multaj historioj.
Unu tute certe estas vera: ke tre multaj junaj
Graz-anoj unuafoje interkisis sin ĉi tie...

47 RETURNE AL MALNOVA URBO / ROKVOJETO

Por la returna vojo al la malnova urbo ekzistas kelkaj alternativoj: komferte per la spektakla vitra lifto en la monto, rapidege per la kastelmonta glitejo aŭ sur la promenvojo al la Karmelita placo direkte al Sporgasse; la verŝajne plej romantika vojo kondukas preter la fascina Herberstein-ĝardeno laŭ la rondcifere 260 ŝtupoj de la kastelmonta ŝtuparo.

48 HERBERSTEIN-ĜARDENO

n la jaro 1930 oni faris la Herberstein-ĝardenon alirebla ek de la „milit-vojetto“, kaj tiel la „pendantaj ĝardenoj de Graz“ estis malfermitaj por la publiko. La terasa instalaĵo kun ĝia plantita mediteranea flaŭro (kiel figoj, citron- kaj ginko-arboj kiel ankaŭ glicinoj) apartenas al la plej belaj ekzemploj de la ĝarden-arĥitekturo de la intermilita tempo.

49 LA TUNELA SISTEMO EN LA MONTO (sen bildo)

Dum la dua mondmilito en la interno de la monto estis instalita ampleksa tunela sistemo, kiu servis kiel bombŝirma bunkro por ĝis 40 000 personoj. Tiuj tuneloj ankaŭ nuntempe estas ankoraŭ parte uzataj, ekz. kiel piedvojo transverse tra la monto de la Kastelmonta placo al la Karmelita placo, aŭ kiel alirejo al la „vitra lifto“ en la monto kaj al la „Katedralo en la monto“, subtera halo por aranĝoj. Ankaŭ la Graz-a fabelfervojo en la monto uzas parton de la malnova tunela sistemo

50 SCHLOSSBERGRUTSCHE (KASTELMONTA GLITEJO) & THE FLIGHT GRAZ 4D KINEJO DE TRAVIVAĴOJ

La „Kastelmonta glitejo“ kun 64 metroj estas la tutmonde plej alta subtera glitejo. Sur 175 metroj oni ĉe tio dum ĉ. 40 sekundoj glitas rapidege malsupren tra ŝanĝantaj kurboj, kio estas speciala travivaĵo por adoltoj kaj infanoj. En la „The Flight Graz 4D“ Erlebniskino (Kinejo de travivaĵoj) la vizitanto estas kunprenata al ekscita flugo el la perspektivo de muŝo al pli ol 25 allogaĵoj de la urbo. Per moveblaj „Full Motion“-seĝoj kaj efektoj kiel vento, nebulo, sapvezikoj kaj akvo oni spertas la urbon Graz kiel neniam antaŭe.



47



48



50



50

LA RESTORACIOJ SUR LA KASTELMONTO

Alte super la urbo vi ĝuas unuaklasan gastronomion: la restoracioj sur la kastelmonto estas ŝatata renkontejo, ne nur ĉe la Graz-anoj.

4D ERLEBNISKINO KINEJO DE TRAVIVAĴOJ SUR LA KASTELMONTO **GRAZ FLUGANTE** TRAVIVADO PER ĈIUJ SENSOJ



**LA PLEJ GRANDA
SUBTERA GLITEJO
DE LA MONDO**

schlossberggrutsche.at
slidegraz.com



GRAZ CARD

Esploru la urbon Graz en
24, 48 aŭ 72 horoj

Tute senhaste per buso, trajno kaj
Bim (tramo) vi travivas senkoste
multnombrajn allogaĵojn.

Ek de aprilo 2023 vi profitas de aldonaj
rabat-avantaĝoj ĉe pliaj muzeoj kaj
vidindaĵoj.

Ideale por familioj: Por unu karto po
2 infanoj sub 15 jaroj senkoste kune
profitas de ĉiuj avantaĝoj.

graz-card.com

**GRAZ
CARD** 24 h
48 h
72 h

Publikaj trafikiloj,
muzeoj,
kastelmonto
kaj pli ...



GRAZ

VIZITINDAJ CELOJ EKSTER LA CENTRO.

Nur kelkajn minutojn distance de la malnova urbo de Graz atendas ankoraŭ tuta vico da pliaj urbaj belaĵoj.

51* KASTELO EGGENBERG 🏰

Princo Johann Ullrich von Eggenberg en 1625 konstruis kastelon kun kosma simbolforto: 4 turoj simbolas la sezonojn, 12 pordegoj la monatojn kaj 365 fenestroj la tagojn. La kastelo estas parto de la Universala Muzeo Joanneum, ĝi entenas krom la pompaj salonoj ankaŭ la Malnovan Galerion, la Münzkabinett (numismatikan kolekton), la grandiozan planedoĝardenon kaj belegan kastelparkon. La kastelo Eggenberg estas monda kultura heredaĵo! **Atentu: Sezonaj tempoj de malfermo!** (Tramlinio 1, haltejo Schloss Eggenberg)



51

52 BAZILIKO MARIATROST

Ek de 1714 la baziliko estis starigita supozeble de la arĥitektoj Andreas kaj Johann Georg Stengg laŭ komiso de la Paŭlana Ordeno. Ĝian koran pecon formas Maria-statuo, kies vaste rakontitaj miraklofaroj jam en la 17-a jc. allogis multnombrajn pilgrimantojn. (Tramlinio 1, finstacio Mariatrost)



52

53 UNIVERSITATOJ DE GRAZ

Rondcifere 60 000 studentoj plenigas la 4 universitatojn, la 2 fakajn altlernejojn kaj la 2 pedagogiajn fakajn altlernejojn. La plej tradici-plena estas la Karla-Franciska Universitato, ek de la fino de la 19-a jc. la instruo okazas sur la spaco de universitata kampo. El la Teknika Universitato eliris kaj eliradas tutmonde konataj arĥitektoj, kaj la Arta Universitato de Graz posedas la plej malnovan ĵaz-sekcion de Eŭropo.

54 BOTANIKO ĜARDENO, LA FORCEJOJ

En la vilaa kvartalo de la Schubertstrasse de Graz interŝoviĝas tri parabolaj cilindroj el akril-vitro. Ilia ideala orientigo ebligas en la interno abundan kreskadon de plantoj el kvar diversaj klimataj zonoj. (Tramlinio 1, haltejo Hilmteich/Botanischer Garten)



54

55 HILMTEICH (LAGETO) / LEECHWALD (ARBARO) – (sen bildo)

Kiun aktivecon vi preferas? Ĉu romantikan veturon per boato? Ĉu leĝeran grimp-travivaĵon en la aktivec-parko? Aŭ ĉu vi volas en kur-ŝuoj esplori la arbarajn vojojn? Kaj la Hilm-lageto kaj la najbara Leech-arbaro ofertas la plej diversajn eblecojn por travivaĵoj. (Tramlinio 1, haltejo Hilmteich)



53

** Eble Kastelo Eggenberg ŝajnas al vi konata? Ĝi servas ĉiam ree kiel filmkuliso en germanlingvaj filmoj.*

VIZITINDAJ CELOJ EKSTER LA CENTRO.

Moderna arĥitekturo, sakrala arto aŭ ruinoj el la mezepoko: komuna estas por ili la meditiva ĉirkaŭaĵo – bonega por libera spirado!

56 LEECHKIRCHE (PREĜEJO) – (sen bildo)

La Leechkirche estas la plej malnova Maria-preĝejo de Graz kaj unu el la plej valoraj frugotikaj konstruaĵoj en Aŭstrio. Speciale notindaj estas la vitraloj en la ĥorejo. (Buslinio 31, haltejo Zinzendorfgasse)

57 KASTELRUINO GÖSTING (sen bildo)

La iam fiera mezepoka kastelo post incendio en la 17-a jc. kadukiĝis, nuntempe staras ankoraŭ nur la kastela kapelo kaj la turo. (Buslinio 40, finstacio Gösting + 20 min. da piedvojo, nuntempe fermita!)

58 KALVARIA MONTO

Sur la krucvojo, tamen celtrafe survoje vi estas, kiam vi vizitas la Kalvarian Monton de Graz sur Austein (rokmonteto), iom ekster la urbocentro. Ĉi tie troviĝas la plej signifa kaj plej granda scena prezentaĵo de la suferoj de Kristo en la libera naturo. (Tramlinioj 1, 4, 6, 7 ĝis haltejo Roseggerhaus, ŝanĝo al buslinio 67 ĝis haltejo SchippingerstraÙe)

59 SCHELL COLLECTION – SERUR- & ŜLOSIL-MUZEO

La ŝlosilon al la feliĉo – ĉu oni trovas tiun ĉi tie? Ebla estas ĉio, kaj fascina ĝi estas ĉiukaze, la Schell Collection, la plej granda muzeo de Aŭstrio por seruro, ŝlosiloj, kestetoj, kasetoj kaj arta fergiso kaj samtempe la tutmonde plej granda specialmuzeo. (Buslinio 40, haltejo Zeillergasse)

60 NOVA-AIR

Mondvaste unika - du aviadiloj sur unu tegmento! La Boeing 727-200 estas uzata kiel „Restoracio Boeing“ kaj povas esti rigardata ĝisdetale. La dua aviadilo, rusa Iljuŝin, estas „8os Bar & Restoracio“ Krom Fancy Drinks kaj teraso kun rigardo al la kastelmonto de Graz ankaŭ ĉi tiu flugmaŝino havas por vizitantoj malferman pilotejan pordon. Libera eniro! (Buslinioj 40, 52, 67, parkad-ebleco sur la areo)